# Díaz-Canel trairas la elektrocentralojn en Kubo

H



**Foto / @Luis35521879**

avano, jun 18 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel trairas la landon kiel parto de laborvizito komencita ?i-vendrede al la ok centraloj elektraj (CTE) de la insulo, subtene al la klopodoj por rekuperi la elektran generadon, informis per Tvitero la Prezidanteco.

La kuba ?tatestro alvenis al la orienta regiono de Kubo, unue al la CTE Antonio Maceo en la provinco Santiago de Kubo, kaj sekve al la CTE Lidio Ramón de Felton en la najbara provinco Holguín.

La?planite, la centralo de Santiago de Kubo, anka? konata kiel Renté, devas eniri la sistemon ?i-sabate, kaj ?ia eniro korekta signifos ke ni havas unuan sukceson, kaj sukceso estigas pliajn sukceson, esprimis la prezidento.

Ne hazardas starti mian viziton ?i-tie, ?ar ?i tiu estas la unua riparlaboro, kiu konkreti?as kiel parto de la procezo por bontenado, kiun oni faras en tiuj ?i gravegaj centraloj por elektra generado en la teritorio, li aldonis.

Surloke, Díaz-Canel konstatis la progresojn de la strategio kreita por rekuperi la nacian elektroenergetikan sistemon, dama?itan de la usona sie?o, kiu malebligas al Kubo aliri energetikajn merkatojn.

Li anka? rekonis la sindevontigon de la laboristoj de ?i tiuj centroj, al kiuj li esprimis la dankemon de la lo?antaro pro la laborego, kiun ili faras kun la celo subteni la nunan postulon dum ili entreprenas la bontenadon de la blokoj funkciantaj.

La vorto herooj ne estas komplimento por vi; ni konsideras ?in tiel, pro la tuta penado, kiun vi faras en tre malfacilaj laborkondi?oj, li diris en Felton.

Li anka? pripensis la altan preparadon de la specialistoj, kiuj efektivigas tre postulemajn teknologiajn procezojn.

La ?tatestro anka? vizitis ?i-vendredon la CTE Diez de Octubre, en Nuevitas, Camagüey, kies tri generaciaj unuoj funkcias kaj kontribuas 250 MW al la nacia elektra sistemo.

Fonto:PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/291058-diaz-canel-trairas-la-elektrocentralojn-en-kubo

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**